

# *Esperanto en Danio*

21-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2014



Ĉu vi jam aliĝis?

## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

DDFO

### **Adresŝanĝoj al:**

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.


Limdato por la venonta numero:

**01.02.2015**

## **Enhavo**

<b>Fino de rimarkinda jaro – komenco de alia.....</b>	<b>3</b>
<b>Venu jubilei!.....</b>	<b>4</b>
<b>Busa karavano al UK.....</b>	<b>5</b>
<b>Historia angulo.....</b>	<b>6</b>
<b>Recenzo.....</b>	<b>8</b>
<b>Agado ekstera.....</b>	<b>9</b>
<b>Kopenhagaj okazontaĵoj.....</b>	<b>10</b>
<b>TEJO en IKRJO.....</b>	<b>11</b>
<b>Alvoko de la UEA-prezidanto</b>	<b>12</b>
<b>31-a Internacia Esperanto- Sumoo.....</b>	<b>13</b>
<b>Filatela ekspozicio.....</b>	<b>15</b>
<b>Kio nova el Fukuŝima?.....</b>	<b>16</b>
<b>Multilingvismo diskutita en Centreuropa Forumo.....</b>	<b>20</b>
<b>Inspira sukceso el Rumanio.</b>	<b>26</b>
<b>La kreola lingvo de Maŭrcio.</b>	<b>26</b>
<b>Esperanto kontraŭ alchajmero .....</b>	<b>27</b>

## Fino de rimarkinda jaro – komenco de alia



Alproksimiĝas la fino de la jaro, kies fokuso estis precipe direktita al la datreveno de la unua mondmilito, tiu terura okazaĵo, kiu bedaŭrinde ne estis la lasta, nek eble la antaŭlasta. La groteska nuna maltrankvila monda situacio alportas al la demando: kion ni lernis de la historio?

Iam, dum la nua mondmilito, Zamenhof multe suferis pro tiu evento, sed tamen havis la forton ĵus antaŭ sia morto sendi sian moralan testamenton kiel malferma letero al la diplomatoj. Liaj vortoj kun propono unigi Eŭropon ŝajnis tiam naivaj, sed la bonsenco venkis kaj alportis finfine al la fondo de Unuĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio jardekojn poste. En la historia trarigardo de tiu ĉi numero vi povas legi lian alvokon al la diplomatoj.

Venontjare ni festos alian gravan mejloŝtonon de nia movado: la centan Universalan Kongreson! Jen, la historio denove tuŝas nin kaj mi certas ke tiu kongreso estos mirinda, laŭ pluraj vidpunktoj. La estraro de DEA diskutis la eblecon organizi bus-karavanon al Lille kaj en paĝo 5 vi trovos la detalojn pri tiu oferto. La informoj estas intence skribitaj en la dana lingvo, por ke ankaŭ niaj komencantoj povu senpere kompreni. Ni ofte konstatas, ke niaj novaj membroj ne partoprenas kongresojn, ĉar ili timas ke ilia lingvoscio estas tro malgranda, kaj ke ili ne profitos partoprenante. Tute male estas, ĉar ĝuste la kongresoj donas unikan bildon de nia movado kaj spronas al daŭra studado.

Alia grava aspekto estas renkontiĝo kaj konatiĝo kun enlandaj samideanoj. Pro tio ni pripensis ke estus alloge organizi buskaravanon. Do, nia intenco pri buskaravano havas plurajn aspektojn.

Ni havas sufiĉe grandan grupon da interesitoj, jam pli ol dudek personoj, kaj ju pli da personoj aliĝas, des pli malmultekosta estos la vojaĝo. Ne hezitu aliĝi al tiu nia propono, tiuj kiuj ankoraŭ ne faris, ĉar ni deziras tre baldaŭ havi la finan nombron de partoprenantoj.

Aliĝu al la 100-jara jubilea kongreso, kies interesaj temoj atendas vin!

*Ileana Schröder*

## Venu jubilei!

Baldaŭ okazos la 100-a Universala Kongreso de Esperanto. Grava, simbola evento, ronda cifero, ebliganta jubilei.

Ni faru ion por tio, ke ĝi iĝu signifa kaj rimarkinda, priraportinda ankaŭ al la ne-esperanta publiko.

Estas kreiganta alia gvidteamo por la pritraktado de la Kongresa Temo: “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj” je monda, movada nivelo (en lokaj grupoj, Landaj Asocioj, ktp), cele ankaŭ al pretigo de kontribuoj al la Kongresa Rezolucio.

Por ke la 100-a UK iĝu vere rimarkebla internacinivele (kaj ne nur el la najbara strato en Lille), ĝi devus ankaŭ havi (interalie) signifan, imponan, impresan nombron da partoprenantoj.

Se vi jam decidis kaj scias, ke vi partoprenos ĝin, bonvolu jam nun aliĝi. Ĉirkaŭ vi, kaj asocie, lokagrupe, varbu por la kuniĝo de multegaj esperantistoj en tiu plej grava jara evento de esperanto, nun eĉ jubilea.

Ne sufiĉas fari belajn kaj ‘konvinkajn’ kalkulojn pri milionoj da esperantistoj – se ‘el ili’ aperas nur kelkcenteto da kongresanoj eĉ en la 100-a UK, ĉar tiam ni povos daŭre rakonti nur pri niaj revoj.

Ni *kaj* produkti tiujn milionojn revatajn, *kaj* konvinku samideanojn reale ekzistantajn pri tuja (baldaŭa) aliĝo al tiu jubilea UK. La organizantoj, LKK povas pli certe agi, plani, mendi, pretigi la kongreson kaj lui servojn, se ili scias pli ekzakte pri la partopren-nombro jam sufiĉe frue. Kaj ju pli da kongresanoj estos, des pli la servoj malmultekostas kaj ĉiu kongresano el tio profitas.

*Stefano Keller*

# Busa karavano al UK

(Danlingva anonco)

## **Bustur til Universala Kongreso nr 100 i Lille i Nordfrankrig 2015**

I et samarbejde mellem KEK og DEA, vil vi tilbyde samlet bustransport til og fra den årlige verdenskongres. Vi mener, at det vil styrke vores sammenhold, og at det bliver en dejlig oplevelse at rejse sammen. Starten bliver tidlig fra København den 24/7 og går til Kolding for at tage passagerer op der.

Kongressen starter 25/7, så vi kører helt til Lille på en dag, og turen afhænger selvfølgelig af, hvor tæt trafikken bliver på motorvejene. Hjemturen starter efter kongressens afslutning ved middagstid den 1/8, og vi overnatter et sted på tilbagevejen. Prisen på en overnatning på tilbageturen på hotel må forventes at blive ca 450 kr. Der er toilet i bussen.

Turen kræver to chauffører, hvor jeg for at reducere prisen deltager som den ene.

Prisen bliver billigere jo flere der deltager, og der er i øjeblikket 23 interesserede.

Ved 25 deltagere ca 1800 kr. Ved 30 deltagere ca 1500 kr.

Prisen er uden forplejning undervejs og uden udgift til hotel på tilbagevejen.

Vi bliver nødt til at reservere bussen i god tid, og må derfor bede om bindende tilmelding senest den 1/12, som kan indsendes pr. mail til: [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk) eller telefonisk til formanden tlf.: 3251 3116 eller 2887 3116.

Beløbet skal være betalt inden 1/1 2015. De indbetalte beløb tilbagebetales ikke medmindre turen aflyses.

*Peter Wraae*

## Historia angulo

Dum la unua mondmilito Zamenhof sukcesis iel sendi esperantan artikolon kiu aperis en “British Esperantist”, kun peto, ke aliaj gazetoj represu ĝin: ĝi estis la politika testamento de Zamenhof.

### Post la Granda Milito: Alvoko al la Diplomatoj



“Terura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomatoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas.

Kiam vi kunvenos post la plej eksermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ

denove interrompas diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj....

Ĉu vi komencos simple refaradi kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidus, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tian laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur negrava parto de viaj laboroj; gardu vin, ke la refarado de la karto ne fariĝu la tuta esenco de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj, kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro elportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per refarado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu gento estos samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva: sur ĉiu dispartebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne unu gento, sed

ankaŭ aliaj gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado.”

Kion do Zamenhof konsilis al la diplomatoj?

“La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonesentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon: ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj”.

Zamenhof pliklarigis tiun principon, kiun li longe kredis, kaj faris alian proponon, kiu en 1915 ŝajnis eĉ pli neordinara: “Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn ‘Unugitajn Ŝtatojn de Eŭropo’. Sed se nur estas ankoraŭ tro frue, por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.

Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armiĝado, ĉar tiam oni jam neniam kaj nenie povos diri, ke ‘la patrujo estas en danĝero’. Oni scias ja tre bone, ke la vortoj ‘patrujo en danĝero’ ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: ‘Minacas danĝero, ke sur la terpeco, kie ĝis nun mia gento estis mastro, kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro, kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro, kaj mia gento estos nur tolerata.’ La forigo de ĉiu subpremo de minoritatoj forigus la kaŭzon de intergentaj konfliktoj.

Mi scias tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos subite, en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomatoj farus. Sed por tio poste laboros jam personoj privataj per predikado, edukado, alkitimiĝado k.t.p.; de vi diplomatoj ni atendas nur, ke vi donu al ni la eblon fari tion. Reciproka malamo

inter la diversaj gentoj de la homaro ne estas io natura, kiel ne estus natura ia reciproka malamo inter la diversaj familioj de unu gento: la malamon kaŭzas nur – krom la facile forigebla reciproka nekomprendado kaj rekonado – la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj”.

Lia alvoko finiĝis:

“Sinjoroj diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiun starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon estas: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj”.

*El la biografio de Zamenhof de Majorie Boulton*

## **Recenzo**

*Tra Densa Mallumo. Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo (Laborista Esperanto Klubo, Kopenhago, 1942).*

Tiu libro priskribas la historion de LEK (Laborista Esperanto Klubo) en Kopenhago okaze de ĝia 10-jara datreveno en aŭgusto 1942. Tiutempe Danio estis okupita de Germanio en la 2a mondmilito. La verkistoj – Poul Thorsen, Svend Iversen, Brita Olsson, Paul Neergaard, Tage Lau – skribas bone kaj vigle. Mi vere komprenas la titolon kaj la teksto ‘pentras’ la tempon antaŭ miaj okuloj. Ĝi estas tre malluma periodo en la dana historio. La verkistoj pensas ke Esperanto pereos, do gravas kolekti la Esperantajn librojn kaj aliajn tekstojn por la tempo post la milito, por tiam revivigi la esperantan movadon. Tial la tria ĉapitro priskribas la Esperantan lingvistikon (kun bibliografio!).

*Tara Gregers*



## Agado ekstera



La 23-an de aŭgusto ni havis budon ĉe “Smag verden” (Gustumu la mondon), unutaga festivalo en Kopenhago por interproksimigi novajn kaj malnovajn civitanojn.



Bent Jensenius trovis novan bonan lokon por informi eblajn interesotojn. Jen li deĵoras en “la foiro pri kvalitaj vojaĝoj” (Rejse-messen for Kvalitetsrejser), kiu okazis inter la 18a kaj la-19-a de oktobro en la ekspoziciejo de DGI-byen, tuj apud la kopenhaga ĉefstacidomo.

## Kopenhagaj okazontaĵoj

La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a horo (la unuan lundon de la monato je la 12-a horo).

Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto [peter@wraae.dk](mailto:peter@wraae.dk).

10/11 je la 19.00 horo en ĉambro D.

Ne estas programo, sed ĉiuj estas bonvena por babili.

17/11 je la 19.00 horo en ĉambro D.

Bent Jensenius gvidos.

Jean Forge: SATIRA NOVELARO EL ESPERANTUJO

Dua novelo: Nia Nigra Filo

(el la libro: La Verda Raketo)

1/12 je la 12.00 horo en nia oficejo en la supre etaĝo

Ana Røssum faros kvizon.

8/12 je la 19.00 horo en ĉambro D.

Betty Chatterjee gvidos.

Ni legos la trian capitron (paĝoj 33-47) de Mia Fuena Infanaĝo, de

Carl Nielsen. Se vi ne jam posedas la libron ĝi estas aĉetebla por 100 kr.

24/11 je la 19.00 horo en ĉambro D.

Ileana Schrøder parolos pri la venonta UK en Lillo (Lille), Francio.

14/12 je la 14.00 horo

Zamenhof-festo

Programo sekvos.

## TEJO en IKRJO

TEJO estis ĵus elektita en la prestiĝa ĉefa plenuma organo de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj (IKRJO, angle ICMYO). Tiu organizaĵo estas internacia reto por la plej grandaj junularaj movadoj kaj regionaj junularaj platformoj. Ĝi oficiale fondiĝis en 2004, kaj estis plie fortigita en 2013.

Tiu granda atingo estis ebla ĉefe danke al la senlaca laboro de Fernando Maia Jr., brazila aktivulo kaj prezidanto de BEJO, kiu multe laboris por la kandidatiĝo de TEJO. Fernando nun estas en Bakuo, Azerio – por partopreni en la 1-a Monda Forumo pri Junularaj Politikoj, kaj en la IKRJO-renkontiĝoj.

IKRJO celas kunmeti kaj reprezenti la diversajn voĉojn de la junularaj organizoj en la tuta mondo, por havi pli fortan influon al tutmondaj junularaj politikaj agoj kaj atingi plenan partnerecon inter junularaj organizoj kaj gravaj koncernatoj. Nuntempe ĝi renkontiĝas unufoje dum la jaro en Jara Kunsido kiun organizas tiucela laborkomitato, elektita la antaŭan jaron de la membroj.

La aliĝo estas granda sukceso por TEJO. Ĝi ricevis same multe da voĉoj kiel grandaj kaj konataj organizoj (ekzemple YMCA) kaj eĉ pli ol la Monda Skolta Organizo. Tiu ĉi sukceso sekvas multjaran laboron de TEJO en Eksteraj Rilatoj.

Ĝian komisionon formas 47 anoj, kiuj estas tre aktivaj, retumas kun pluraj organizoj, partoprenas pozitive kaj konstrue en pluraj eventoj tra la mondo. En la lastaj jaroj TEJO estis reprezentata plurfoje en oficialaj junularaj aranĝoj en Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio.

Se vi volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bv. konsideri donaci tra UEA kun priskribo: “TEJO-KER”. Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe [http://uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html).

*(Laŭ informoj de Francesco Maurelli kaj Vikipedio)*

## **Alvoko de la UEA-prezidanto**

### **Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!**



Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en nia vicoj multaj “veteranoj” de la movado. Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian “rondon familian,” kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigu ilin—dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, Lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por mencii, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21-a jarcento!

Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto.** Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado.** Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA, **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon – eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100-a Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

*Mark Fettes*

## **31-a Internacia Esperanto-Sumoo**

Ekde la 9-a de novembro 2014 ĝis la 23-a okazos la 31-a Internacia Esperanto-Sumoo. Ĉu vi ne legos libron kun esperantistoj en la tuta mondo? Por detala informo, legu:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Okaze de tiuj konkursoj mi organizas Esperanto-sumoo-n. En la lasta sumoo en septembro partoprenis 164 homoj el 26 landoj kaj entute legis 15000 paĝojn.

#### 1. Celoj:

- 1) Altigi legkapablon de esperantistoj.
- 2) Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo

#### 2. Luktmaniero:

- 1) Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
- 2) Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago.
- 3) Laŭ la irado de vera Sumoo-konkurso, ni komencas legi. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj, vi akiros unu venkon en tiu tago, se ne malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi luktas ne kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

#### 3. Aliĝo:

Sendu jenajn informojn al HORI Jasuo: [horizonto@water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@water.sannet.ne.jp).

- 1) Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso, via luktista nomo
- 2) Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kvanto da paĝoj, kiujn vi legos por unu tago

#### 4. Raportu vian rezulton

Kiam komenciĝos la Sumoo, ĉiun duan aŭ trian tagon (ne nepre) raportu al la prizorgantoj pri venko aŭ malvenko.

Al perfektaj venkintoj kun 15 venkoj ni donos diplomon.

*Iniciatinto de Esperanto-sumoo HORI Jasuo*



## Filatela ekspozicio

Je la 17a de oktobro la ĉefo de la Esperanto-urbo, urbestro Gerhard Walter mem, malfermis la novan kaj riĉan ekspozicion. Li miris, ke filatelo rilate al Esperanto prezentas jam vastan kampon.

La estraro de la filatelistoj el Herzberg, sub gvido de Dieter Weiser, ankaŭ ĉeestis. Ili laŭdis la variecon de la interesa fakekspozicio.

Gazetredaktoro preparis artikolon por la regiona gazeto "Harzkurier".

Jam temas pri la deka Esperanto-fakekspozicio en la bela kastela muzeo.

La vizitantoj de la muzeo tre ofte laŭdas la Esperanto-ekspoziciojn, ĉar tio estas unikaĵoj. Homoj grandkvante kunportas Esperantajn flugfoliojn.

Ili venas ne nur el Germanio, sed el multaj landoj. Antaŭ nelonge ekzemple vizitgrupo el Islando rigardis nian ekspozicion

Ĝis la mezo de aprilo 2015 prezentiĝas la nova faka ekspozicio. Pli ol 150 etajn objektojn vi trovos tie, interalie:

- Poŝtmarko Luitpold kun talonteksto "Vegetarisches Restaurant Esperanto München", 1911
- Aŭfrankita koverto "Konsulo de Amikejo", Moresnet, 1909
- Aŭfrankita koverto "Park-Urbo", Munkeno, ĉ. 1909
- Esperanta poŝtmarko de 300 dinaroj, Triesto, 1953
- diversaj dulingvaj poŝtmarkoj el Sovetunio, ĉ. 1925

Bonvenon!



## Kio nova el Fukuŝima?

*Ni multe aŭdis pri la atomcentrala akcidento en Japanio en marto 2011, sed kio okazis intertempe? Jen statraporto datita la 16-an de oktobro 2014.*

### **Novaĵoj pri Fukuŝima kaj la atomenergia situacio**

La akcidento de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima jam fariĝis por multaj homoj unu pasinta afero en la historio, sed ankoraŭ nun la problemoj tute ne solviĝis kaj minacas nian vivon. Hodiaŭ mi raportos pri la situacio pri nukleaj problemoj en Japanio.

### **Rilatanta mapo**



### **Kiel oni povos malmultigi la kvanton de poluita akvo?**

Kiam Japanio invitis la Olimpikojn de 2020 al si, la ĉefministro deklaris al la mondo, ke la poluita akvo estas regata kaj ne kaŭzos problemon al la partoprenantoj, sed la fakto estas tute alia. Li mensoge invitis Olimpikojn al Japanio.

La Nuklea Centralo n-ro 1 staras sur subteraj akvaj fluoj, kaj ĉiun tagon 400 tunoj da akvo enfluas sub la detruitajn reaktordomojn kaj poluiĝas. Se oni farus nenion pri tiu akvo, ĝi enfluus en la maron, sekve poluus la tutan




maron en la mondo. Por eviti tion, TEPCO ĉerpas tiun akvon kaj metas ĝin en grandegajn akvujojn en la tereno de la Centralo. Do kiel malmultigi tiun enfluantan akvon estas tre grave. TEPCO provas tri rimedojn.



### 1) Ĉerpi la akvon antaŭ ol ĝi enfluos en la Centralon

TEPCO ekĉerpis tiun akvon en majo, intencante malpliigi la kvanton je 100 tunoj, sed ankoraŭ nun la efiko ne estas klara. Pro tio en aŭgusto TEPCO publikigis alian rimedon: ĉerpi akvon el la pontoj proksimaj al la reaktordomoj kaj forĵeti ĝin en la maron foriginte la radioaktivaĵojn el ĝi, sed la fiŝistoj en Fukuŝima forte kontraŭas tion, ĉar ili ne kredas TEPCO-n kaj timas pli da “misfamo” aŭ “mal-famiĝo” de la fiŝoj, kiujn ili kaptas.

### 2) Konstrui glaciigitan termuron ĉirkaŭ la detruitaj reaktordomoj



Oni planas konstrui glaciigitan termuron 1,5 kilometrojn longan kaj 30 metrojn profundan. Por konstrui ĝin, oni komencis unue glaciigi la juntojn de la reaktordomoj kaj la subteraj tuneloj por forigi poluitan akvon el tiuj ĉi, sed ĝis nun oni ne sukcesis en tio. Multaj homoj nun dubas, ke oni sukcesos konstrui tiun grandegan termuron.

### 3) Forigi radioaktivaĵojn per ALPS



ALPS estas maŝino, kiu kapablas forpreni 62 specojn de radioaktivaĵoj krom tricio. Oni planas plene funkciigi tri ALPS-on kaj ĝis la fino de la venonta marto senpoluigi 400 mil tunojn da poluita akvo el 470 mil tunojn konservatajn en la tereno, sed sinsekve okazas problemoj en tiuj maŝinoj kaj oni ankoraŭ ne povas funkciigi ilin plene. Krome eĉ se oni sukcesos, restos tricio en la “purigita” akvo. Kiel trakti tiun akvon oni ankoraŭ ne decidis. TEPCO kaj la registaro kompreneble

volas forĵeti ĝin en maron.

### **Forprenado de nukleaj brulaĵoj el la reaktoroj**

Por finforĵeti la detruitajn reaktorojn, oni devas unue forpreni la brulaĵojn el la reaktoroj. El la reaktoro n-ro 4 oni komencis forpreni brulaĵojn el la akvujo en novembro 2013 kaj ĝis nun 80 procentoj da ili estas forprenitaj.

En la reaktoroj n-roj 1, 2 kaj 3 la nukleaj brulaĵoj fandiĝinte falis sur la fundon kaj oni eĉ ne scias, en kia stato estas la interno de tiuj reaktoroj, ĉar la radioaktiveco estas tiel forta, ke homoj ne povas alproksimiĝi.

### **Mesaĝo de la urbestro de Hirono**

La urbo Hirono situas tuj sude de la Nukleaj Centraloj de Fukuŝima. Sed jam de 4 jaroj estas permesite al la loĝantoj reveni hejmen pro ne tre forta radioaktiveco. Tamen multaj loĝantoj ne volas reveni pro timo pri radioaktiveco kaj pro la maloportunaj loĝkondiĉoj. Okaze de la 4a datreveno de la permeso, la urbestro Endoo parolis, citante vortojn de Joŝida Ŝooin (pensulo, 1830–1859):

Ni volas forte paŝi antaŭen por restarigi nian urbon, ĉiam tenante revon, kiel Joŝida Ŝooin skribis:

*Tiuj, kiuj ne havas revon, ne havas idealon,  
Tiuj, kiuj ne havas idealon, ne havas planon,  
Tiuj, kiuj ne havas planon, ne havas agadon,  
Tiuj, kiuj ne havas agadon, ne havas sukceson,  
tial tiuj, kiuj ne havas revon, ne havas sukceson.*

(La ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 3an de oktobro 2014)

Tamen la restarigo estos tre malfacila. Nun 1679 homoj, triono de la loĝantoj, revenis kaj loĝas en la urbo, sed ne nur ili sed ankaŭ aliaj 3000 fremduloj loĝas. Ili estas laboristoj por la Nukleaj Centraloj. La urbo decidis havigi al si funkcion por riparado kaj forĵetado de ses reaktoroj de la Nuklea Centralo n-ro 1. En tiu situacio kiun revon loĝantoj povos havi?

### **Rizrikoltado en la urbo Tomioka**

La urbo Tomioka, en kiu staras la Nuklea Centralo n-ro 2 de Fukuŝima,

estas proksima de la detruitaj reaktoroj, tial oni ne povas loĝi en ĝi. En la lasta jaro en kelkaj kampoj oni prove kultivis rizon por esplori la influon de radioaktiveco, kaj ĉiu rikoltita rizo estis forĵetita. Ĉi-jare unuan fojon



post la nuklea akcidento oni rikoltis rizon por vendi en la kampoj en la distrikto Ŝimo-Koorijama. La kultivistoj, loĝante en la urbo Koorijama for de sia hejmo, fojfoje vizitas la kampojn. “Agrikulturo estas baza industrio de la urbo. Tiu rikoltado estas unua paŝo por la restarigo de la urbo”, diris s-ro Ŭatanabe Jasuo. Oni klopodas produkti pli

bongustan kaj malpli kostan rizon por la venonta jaro. (La ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 3an de oktobro 2014)

### **La Nacia Vojo n-ro 6 en Fukuŝima estis malfermita**

La 15-an de septembro 2014 Nacia Vojo n-ro 6 inter la urboj Futaba kaj Tomioka (14 kilometroj) estis malfermita al aŭtomobiloj. Tiu parto estis fermita post la akcidento pro densa radioaktiveco. La Nacia Vojo n-ro 6 estas tre grava, ligante Tokion kun la urbo Sendai, do oni bonvenigas la malfermon. Tamen piedirantoj, biciklistoj kaj motociklistoj ne povas eniri, ĉar ankoraŭ radioaktiveco estas forta. La 24-an de septembro mia amiko veturis laŭ tiu vojparto kaj detektis 19,51 mikrosivertojn da radioaktiveco. Vi rememoru, ke la maksimuma limo, kiun la registaro decidis, estas 0,23 mikrosivertoj.



### **Du elektraj kompanioj komencis diskuti pri forĵetado de siaj reaktoroj**

En Japanio nun ekzistas 18 malnovaj reaktoroj, kiuj havas pli ol 30 jarojn. Post la nuklea akcidento la reguloj pri nukleaj centraloj fariĝis pli severaj, tiel ke por plilongigi la vivon de tiuj reaktoroj pli ol 40 jarojn, oni devas adaptigi ilin al tiuj novaj normoj, elspezante multege da mono. Pro tio du elektraj kompanioj, Kansaja kaj Kjuuŝua, komencis esplori eblecon forĵeti

kelkajn. Aliflanke, faronte tion, ili celas konvinki popolanojn pri refunkciado de novaj reaktoroj.

## **61% de la popolanoj kontraŭas refunkciigon de reaktoroj**

La 27-an kaj 28-an de septembro la Societo de enketado faris enketon pri diversaj temoj kaj ricevis respondon de 1675 homoj el 3000. Pri la refunkciigo de reaktoroj enketitoj jene respondis:



Demando: La registaro intencas refunkciigi la reaktorojn, kiujn la Nuklea Reguligada Aŭtoritato konstatos sekuraj. Ĉu vi estas por aŭ kontraŭ la refunkciigo de la nukleaj reaktoroj?

Por: 34,2%

Kontraŭ: 60,5%

Aliaj: 5,3%

Viroj: por: 44%, kontraŭ: 52%

Virinoj: por: 24%, kontraŭ: 69%

---

## **Multilingvismo diskutita en Centreuropa Forumo**

### **Du eŭroponivelaj politikistoj serioze traktas multlingvismon**

Jam la naŭan jaron esperantistoj sukcesis partopreni en la 24-a Ekonomia Forumo de Centra Eŭropo, okazinta inter la 2-a kaj 4-a de septembro en la sudpola urbo Krynica. Ili partoprenis per bunte aranĝita stando, kiu de jaro al jaro rajtas okupi pli kaj pli da loko, kaj plie per paneldiskuta programero pri la eŭropa lingva situacio. Pensante, ke al la forumo venas miloj da partoprenantoj, la agado, unuavice sub la ŝildo de la Eŭropa Esperanto-Unio, havas grandan konigan valoron inter ŝlosilaj homoj. Unuafoje, aktive partoprenas Universala Esperanto-Asocio pere de nepola reprezentanto.



La partopreneblo estas dankebla al la delonga iniciatemo de EEU, kune kun la senlaca loka aganto, Halina Komar. Necesas ankaŭ agnoski la rolon de la prizorgantoj de la budo: Petro Balaž (SK), Dorota Rodziano (PL) kaj Matthieu Desplantes (FR), la lastaj du staĝantoj ĉe E@I en Slovakio. La partopreno de la Esperanto-teamo en la Forumo ricevis financon subtenon de UEA, ESF kaj la fondaĵo 'Esperanto Internacia'.



Ĉi-jare la panela diskuto rajtis okupi ne horon sed 90 minutojn. Ĝi okazis en merkredo, la 3an de septembro, ekde 18.35h kun la titolo “Multlingvismo en Eŭropo: ebloj por ĝia konservado”. La oficialaj lingvoj de la forumo estas la angla, pola kaj rusa, kun simultana tradukado por ĉiuj el la centoj da programeroj.

La pli ol 300-paĝa programo dediĉas tutan paĝon al tiu kunsido, kun la sekva resumita enkonduko: “EU oficiale subtenas multlingvismon, rekomendante, ke ĉiu civitano lernu almenaŭ tri lingvojn, inkluzive de la gepatra. Sed kio okazas en la praktiko? Tre malmultaj personoj atingas duan lingvon ĝis la nivelo C1, kaj malpli ol 1% parolas bone trian lingvon. La tuteŭropa taksado de 2012 eĉ ne enketis pri la nivelo C1, ĉar tre malmultaj studentoj atingas tiun nivelon. Ĉu propedeŭtika aliro povos bonigi la situacion? La panelo diskutos la praktikajn rezultojn el antaŭaj jaroj, kun ebloj rilate al la nuna eŭropa situacio.”

La gvidanto de la kunsido estas Sean O’Riain, la prezidanto de EU.

Komence, li prezentis la panelanojn, oni projekciis la kantadon de la Eŭropa himno en Esperanto, poste liaj enkondukaj vortoj traktis tri temojn: la financajn, propedeŭdikajn (lernfaciligajn) kaj kulturajn argumentojn por nia lingvo.



*La panelo, de maldekstre: senatano Wittbrodt, Stefan MacGill, Sean O’Riain, Jan Figel kaj Jozef Reinart*

Panelanoj kun intervenaj resumoĵoj, estis la sekvaj:

### **Jan Figel, Vicprezidanto de la Nacia Konsilio de Slovakio**

Unuavice oni povas imagi, ke lingvaj demandoj ne havas prioritaton en Eŭropo, kiu havas gravajn sekurecajn zorgojn atentindaj, sed en la longa daŭro ili gravegas. Ni devas nepre protekti la multlingvecon; se ni perdas tion, ni perdas pli ol ni povas imagi. Konsideru unue la Konsilion de Eŭropo, kiu kovras enorman teritorion, de Lisbono ĝis Vladivostoko, kaj havas 46 membroŝtatojn. Granda nombro da lingvoj en tiu teritorio ne ricevas oficialan statuson en tiu Konsilio. S-ro Figel vidis la temon de multlingveco, kaj dum la prepara fazo por aliĝo de Slovakio al la Unio, kaj poste kiel reprezentanto de ties membro-ŝtato. Li servis de 2004-2009 kiel Eŭropa Komisionano kun respondeco pri Edukado, Kulturo kaj Multlingveco; lia tasko estas iel aldoni plusvaloron al tiuterenaj streboj. La

nombro da lingvoj en EU kreskis de 11 ĝis 21, poste 24, kun uzo de tri alfabetoj. La kostoj de lingvaj servoj en EU sumiĝas je unu biliono da eŭroj jare, ekvivalenta al unu taso da kafo por ĉiu unuopa civitano en la Unio. Iuj el la lingvoj de Eŭropo rolas kiel mondlingvoj; gravas pripensi ankaŭ iliajn mondnivelajn rolojn.

Lingva kaj kultura diverseco estas esenca parto de la EU-familio – surbaze de la rajtoj de la civitanoj. Ĉiu havas la rajton alparoli instancojn en sia propra lingvo; leĝoj fariĝas validaj, nur kiam ili estas akireblaj en ĉiuj lingvoj de la Unio. Gravus kiel ni traktas kaj instruas lingvojn; oni diras, ke kiom estas la kvanto de regataj lingvoj, tiom da homoj ni estas – ĉar ĉiu lingvo malfermas pardonon al la enkuŝanta kulturo. Pri edukado, EU povas helpi, subteni, sed la preciza politiko estas formata je nacia aŭ enlandregiona niveloj. La lingvo-instruaj statistikoj ne montras bonan evoluon; por kontraŭi tion gravas lerni samtempe lingvon kaj ĝian kulturen kuntekston. Indikoj montras, ke la movebloj por homoj forte korelacias kun lingvokono. Sekve, ni bezonas pli bonkvalitan lingvo-instruadon; en tio la novaj membroŝtatoj povos ludi aparte fortan rolon, ĉar ili aldonas novajn lingvojn kaj identecojn, sed bezonos financan subtenon vidigi tiujn. En 2016 Slovakio transprenos la prezidadon de la EU, kio donas gravajn eblojn vidigi la temon de multlingvismo. Li fine diris, ke necesas novaj aliroj, novaj iniciatoj, en kiuj oni konsideru plej diversajn eblojn, implicite, inkluzive de rolo por Esperanto; nepraĵo estas liveri sistemon, kiu kostas malpli da mono sed liveros pli bonajn rezultojn.

### **Edmund Wittbrodt, pola Senatano kaj antaŭa Edukministro de Pollando**

Ni devas pripensi la sekvojn se ni enkondukus Esperanton al la lingva mikso en Eŭropo – ĉu tio kreskigus aŭ malkreskigus la lingvan diversecon? Povus esti, ke ĝi alportus riĉigon. Ĉe teknikaj universitatoj en Pollando 75% el la finstudintoj elektas studi lingvojn, plejparte la anglan, sed ankaŭ la germanan aŭ francan – sed ne sen problemoj. Pri la propedeŭtika valoro, konstatablas, ke kono de la Latina lingvo portas faciligon lerni aliajn lingvojn; ĝuste ĉe Papo Johano-Paŭlo la Dua, frua kono de la Latina simpligis la vojon por lia multlingvaj kapabloj.

Esperanto, estante pli facile lernebla, povus liveri similan rezulton – se jes, ĝi kontribuas al lingva riĉigo.

Senatano Wittbrodt alparolis la kunsidon pollingve (la aliaj angle). Li daŭrigis: “Kiam mi ĉeestis altlernejon, mi aŭdis pri Esperanto, kaj oni por ĝi havis altajn esperojn. Poste tamen venis la epoko de komputiloj, kie 80% de la programoj kaj interfacoj tiutempe uzis la anglan. Tamen, ni povas imagi provojn enkonduki uzadon de Esperanto kiel paŝilo al pliaj lingvoj. Ni estis inspiritaj per la centjara festado de la eldono de la Unua Libro de Esperanto, kaj mi konstatis, ke ekzistas parolantoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Japanio, Ĉinio, Brazilo kaj aliaj Latin-Amerikaj landoj. Esperanto povus ludi rolon en la kontaktoj preter la limoj de la Eŭropa Unio. Pri tiu Unio, ni devas konstati, ke aldono de lando implicas aldoni lingvon, kaj aldoni kostojn. Por pli etaj kunsidoj oni ŝparas kostojn uzante malpli da lingvoj.

La senatano priparolis iniciaton nuntempan ĉe la pola Ministerio pri Kulturo kaj la Nacia Heredaĵo starigi liston de *ne*-materiaz mondheredaĵoj kun la ideo, ke Esperanto eniru tiun liston. Se tio sukcesos, imageblas, ke la koncepto disvastiĝu al aliaj landoj de Centra Eŭropo, unuavice ĉe la Viŝegrada landkvaropo. Li daŭrigis: “Pri lingva evoluigo, ni devas havi internacian aliron. Estus tre malfacile enkonduki novan devigan lingvon en nian eduk-sistemon, sed malpli formalaj ebloj devas ekzisti. Por realisme esplori eblojn, ni devus scii proksimume kiom da parolantoj de Esperanto ekzistas en Pollando kaj en la mondo – tio estus nia komencpunkto. Fine, ni volas aranĝi ke la nuna ekspozicio kiu staras en la pola senatejo transiru iam al la sidejo de la Eŭropa Parlamento.

### **Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA**

Lia lando programe estis indikita kiel Novzelando. Li ripetis resume la propedeŭtikan valoron de la lingvo, sed asertis, ke ĝiaj interkulturaj valoroj devas esti egalmezure emfazataj kaj eluzataj, unue la propraj kulturaj valoroj de la lingvo evoluigitaj tra 120-jara periodo, sed egale aŭ pli grave, ĝia kapablo funkcii kostefike kiel ponto inter aliaj kulturoj. Apoge al tio, li citis la multajn lerneajn interŝanĝprogramojn okazigitajn pere de Esperanto, tipe kun financa apogo de eŭropaj programoj kiel Komenio.



Rilate al planoj starigi konkretan projekton en la Viŝegrada landkvaropo, li esprimis pretecon persone kaj nome de UEA helpi enplekti hungarojn en la planojn.

### **Jozef Reinvart, Ĉefkonsilisto en la slovaka Ministerio pri Eksterlandaj kaj Eŭropaj aferoj.**

Li malfermis siajn komentojn per cito de statistikoj, kiuj montras, ke la lingvoakirado mezurita en 2012 diversmezure falis, kompare kun la analizoj el 2005. Li citis rekomendojn de laborgrupo pri multlingvismo en kiu li partoprenis, liverita en 2011 al la Eŭropa Komisiono. Tio pledis por pli da esploroj pri lingva pedagogio, la rolo de ekzamenado, la prope-deŭtika valoro de diversaj lingvoj, malpliigo de la rolo de la angla lingvo, cele al pli justa pritakso kaj protekto de ĉiuj el la lingvoj en la Unio.

Ferme, Sean O’Riain dankis al ĉiu interveninto, esperante, ke sekvos el la interparoloj konkretaj paŝoj por akceli la temon pri multlingvismo, interalie prepare al la Universala Kongreso de 2016, kiu ja okazos en la Centreŭropa regiono.

La tuta sesio estis registrita, kaj, post la necesaj tradukoj, estos publike alirebla por regantoj de la angla, kio certigas al ĝi vastan publikon.

*Stefan MacGill*

## **Inspira sukceso el Rumanio**

La oka tridek en sabata vespero. Salonpleno rigardas projekcian ekranon. Komenciĝas la kutima kaj konata raportaĵa programo en la ĉefa televida kanalo de Rumanio TVR1. Kiel kutime, la 20-minuta programo prezentas nur unu temon: en la 27-a de septembro, la temo estis Esperanto. Tiu kanalo kaj programo estas spektata en ĉiu lasta vilaĝo de la lando; tiom ampleksa diskonigo per publika komunikilo estas unika kaj unuafoja en la historio de la rumana movado.

La tuto fontis el postsekvoj de la OSIEK-konferenco en Braŝovo julie, iel la produktista teamo mem elektis trakti tiun temon kaj kontaktis s-inon Rodica Todor, kiu donis pliajn kontaktojn; baldaŭ la ĵurnalisto ricevis

buntan dosieron da faktoj, argumentoj, kontakt-personoj kaj svarmo da ret-adresoj. La filma kaj munta procezo daŭris ĉ. du semajnojn. Krom vivaj intervjuoj kun deko da rumanoj, okazis skajpaj intervjuoj kun s-roj Sean O’Riain el Irlando (pri la kostoj de interpretado en internaciaj forumoj) kaj Ionel Oneț el Nederlando (pri la lernfaciligaj kvalitoj de Esperanto).

La raporto estis profesinivele kunmetita (laŭ fakula prijuĝo), kovris rapide multajn terenojn kaj entiris amason da konvinka materialo el la reto: ĉina TV-raportado, klas-interŝanĝoj, la Esperanto-parolanta infaneto kaj multo pli. Ĝia tono estis esence pozitiva, emfazante la kulturajn valorojn, kiujn la lingvo malŝlosas. La juna prezentanto kun iom da preparhelpo li fermis la prezentaĵon per du-tri frazoj en tute konvinka Esperanto.

## **La kreola lingvo de Maŭricio**

*Okaze de la Internacia Tago de la Kreola Lingvo, 28a de oktobro.*

Ĉi jare estas festata la 46-a datreveno de la sendependiĝo de Maŭricio, insulo en la Hinda Oceano. La (maŭricia) kreola lingvo havas tie la plej multnombrian gepatran parolantaron, sed ankaŭ alilingvanoj parolas ĝin en la ĉiutaga vivo. En la oficiala vivo kaj kontaktoj oni uzas la anglan kaj la francan. Alia grava lingvo estas la boĝpuria, devenanta el Barato. Krome vivas en Maŭricio multaj parolantoj de aliaj lingvoj de Barato kaj de Ĉinio.

Por subteni la kreolan lingvon, kiu malgraŭ la vasta uzateco havas nur tre malmulte da literaturaj kaj gazetaraj eldonaĵoj, loka asocio starigis projekton kaj baldaŭ eldonos libron kun kreollingva poemo kaj ties diverslingvaj tradukoj. Origine ili planis tradukigi la poemon en 46 lingvojn (46-a datreveno de la sendependiĝo), sed alvenis pli ol 50 tradukoj.

La lingvistoj D-rino Tove Skutnabb-Kangas (kiu kontaktigis min kun la maŭricianoj) kaj D-ro Robert Phillipson jam delonge subtenas la laboron favore al la kreola en Maŭricio. Sekve de tiu rilatado la maŭricia asocio petis nian kunlaboron. La respondo de 10 esperantistoj el 3 kontinentoj ebligis aldoni 8 pliajn diverslingvajn versiojn de la poemo.

La kompleta kolekto de tradukoj aperos baldaŭ libroforme en Maŭricio. Ankaŭ DVD kunestos surhavante gestolingvan version de la poemo (en la maŭricia gestolingvo).

Jen kreata retpaĝo pri la kreola lingvo-tago, kun la poemo el maŭricio:

<http://www.linguistic-rights.org/kreol/>

Baldaŭ legeblos tie ĉiuj 8 tradukversioj faritaj de esperantistoj, kelkaj ankaŭ aŭdeblos.

*Stefano Keller*

## **Esperanto kontraŭ alchajmero**

La lernado de dua lingvo, eĉ kiel maljunulo, estas rimedo, kiu povas bremsi alchajmeron (la fifaman malsanon de Alzheimer).

Tio estas rezulto de studo, kiu aperis 2012 en la revuo “Trends in Cognitive Sciences”. La ŝanĝo inter du lingvoj estas ekzerco por la cerbo, eĉ se oni lernas la duan lingvon malfrue.

Kompreneble la aŭtoroj ne rigardis al Esperanto.

Ekestus interesa tereno por propagandi Esperanton: Por maljunuloj la lernado de fremda lingvo estas malfacila kaj ili ne rimarkas sukceson, ĉar la lingvo estas tro komplika por aktive paroli. Sed gravas la komunikado en la fremda lingvo, la aktiva utiligado. Per Esperanto oni povas havi pli rapidan sukceson en la lernado kaj relative frue aktive uzi la lingvon.

Supozeble Esperanto povas montri sian pozitivan efikon: Estas sufiĉe multaj maljunuloj, kiuj praktikas Esperanton kaj estas tute aktivaj. Ili vojaĝas ĉirkaŭ la mondo kaj kverelas en mesaĝlistoj.

Indus konvinki organizon, kiuj okupiĝas pri la sano de maljunuloj, permesi komparan studon, kiu komparas la uzon de nacia lingvo (kutime ilie une nur pensas pri la angla, franca ktp.) kun la instruado de Esperanto. La scienca verko eble helpas malfermi la pordojn.

Fonto: <http://www.ncbi.nlm.nih.gov/pubmed/22464592>

*R. Schnell [informado]*

Preben Bagger

# Esperanto Dansk Ordbog



Esperantoforeningen for Danmark  
Dana Esperanto-Asocio/DEA

*Ĉu vi jam havas? Aĉetu ĉe nia libroservo!*